

Kun Michel Frésard pri la verkista talento de Tibor Sekelj.
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1985 majo 25.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-144/Radiokasedo-144-2-903-1985-junio-julio-Claude-GACOND-kun-Michel-Fresard-Pri-la-verkista-talento-de-Tibor-Sekelj.mp3>

Cl.- Parolas Claude Gacond kaj Michel Frésard nome de Svisa Radio Internacia.

Ni daŭrigas nian prelegaron, kiun ni dediĉas al la esperanto-verkisto [Tibor Sekelj](#). Hodiaŭ ni parolos pri lia libro Mondo de Travivaĵoj, kiun eldonis en 1981 Edistudio en Pizo, Italio. Michel Frésard, ankaŭ vi ĵus finlegis tiun ĉi verkon. Kiun impreson ĝi donis al vi?

M.- Impreson de sorĉado. Fakte ĉiuj rakontoj estas interesaj. La suspenso ĉiam majstre enkondukiĝas kaj plidisvolviĝas. Kiam oni komencis legi tiun novelaron, oni emas daŭrigi ĝis la lasta raportaĵo. Tibor Sekelj donis al ni posedindan dokumentaron.

Cl. En sia novelaro Tibor Sekelj rakontas fakte pri aventuroj okazintaj ĉie en la mondo. Li ŝatas eĉ sin prezenti kiel heroon. Eble li iom troigas la danĝerojn, kien li sin metis.

M.- Tio ĉi pravas, ke li estas tre bona novelisto. Li bone spicas siajn rakontaĵojn, sed tamen li ĉiam respektas la veron, ke ĉio estu kiel eble plej kredinda por la legantoj.

Cl.- Tiu suspenso, tiu dramigo kresĉendas ĝis la fino, kaj subite alvenas konkludo. Oni tiam kvazaŭ suferas, ke ne alvenos sekvo al la rakonto.

M.- Precize tio respegulas la fajnan arton de Tibor Sekelj. Li daŭre streĉigas la atenton de sia legantaro, kaj verŝajne ankaŭ de sia aŭskultantaro, kiam li rakontas, ĉar li devas esti bona rakontanto.

Cl.- Jes, tio li estas. Ni spertis pri tio, kiam li vizitis nin en Svislando, okaze de prelegvojaĝo pri sia migrado tra Amazonio. La vespero tro rapide disvolviĝis, tiom interesaj estis liaj rakontoj. Li montris al ni tre belajn fotojn, kaj mi iom bedaŭras, ke en la libro *Mondo de Travivaĵoj* la eldonisto ilin tiel fuŝe reproduktis.

M.- Jes, tiel palaj, tiel malbonaj ili estas, ke mi apenaŭ rimarkis ilin. Nur iom post iom mi amuziĝis diveni, kion reprezentas tiuj palaĵoj, kaj tiam mi konstatis, ke ni troviĝas antaŭ etnografiaj dokumentoj tre valoraj. Strange, ke la eldonisto ne evitis tiun fuŝaĵon, kiu malvalorigas sen tio tre bonan libron.

Cl.- Kiel la novelaro raportas pri la observadoj en la tuta mondo, tiuj fotaj dokumentoj, kiuj povus esti rimarkindaj, nin bilde transportas en tre malsimilajn civilizojn. Ambaŭ, la tekstoj kaj la bildoj perceptigas, ke Tibor Sekelj simpatias kun la homoj, kiujn li vizitas. Kaj oni sentas, ke nenion li improvizis. Antaŭ la vojaĝa esploro li dokumentiĝas legante en multaj lingvoj, kiujn li penis lerni dum jaroj. Li ne estas supraĵa ĵurnalisto, kvankam li grandparte gajnis sian vivon liverante raportaĵojn al revuoj.

M.- Fakte Tibor Sekelj estas tre kulturita homo. Kaj en lia scivolemo troviĝas nenia hontiga sinteno por la observato. Li iras al la aliaj kiel amiko al amikoj, kaj li respektas la kulturojn de

ĉiuj gentoj. Tiu sinteno tutcerte malfermis al li multajn pordojn kaj malkovrigis al li la profundan penson de la vizitatoj. Kaj sian simpatian al ĉiuj homoj, eĉ la plej primitivaj, li transdonas al ni. Mi vivis dum dudek jaroj en Sudameriko, kaj mi povas aserti, ke ĉio, kion skribis Tibor Sekelj pri la landoj kaj gentoj de Sudameriko, korespondas al la faktoj. Pri la seriozeco de lia dokumentado, mi donu la ekzemplon de la trinkaĵo ĉiĉo. Li donas la ekzaktan recepton de tiu duonfermentita aŭ fermentita trinkaĵo el pervirine maĉita maizo.

Cl.- Ankaŭ la stilo de Tibor Sekelj estas tute rimarkinda. Ĝi estas preciza, sed tute ne komplika.

M.- Jes, tre facile oni sekvas lin. Tio flegas en ni la legemon kaj la plezuron. Malgraŭ tre precizaj priskriboj kaj riĉega vortaro, li preskaŭ neniam enkondukas neologismojn. Por la tuta libro preskaŭ tricentpaĝa li apenau proponas dudek fakvortojn, kiuj ne troviĝas en PIV. Kaj temas ĉiam pri vere necesaj vortoj, kiel la indiĝena trinkaĵo ĉiĉo, pri kiu mi ĵus parolis.

Cl.- Tiu nomo de alkoholaĵo estas same pravigebla, kiel la vortoj viskio, ĉampanjo, biero, ktp. Oni ne povus paroli pri tiaj trinkaĵoj, sen utiligi precizan nomon. Estas same por apartaj manĝoj, por la gentoj, funkcioj, tre specialaj kutimoj. La koncernajn neologismojn, kiuj fakte estas fakvortoj, akceptas la leganto. Tibor Sekelj evitas ĉian pedantismon neologismeman, kiu tre oftas ĉe kelkaj nunaj esperanto-verkistoj.

M.- Jes, ĉe Tibor Sekelj, oni neniam sentas sin agresita de nenecesaj vortoj kaj pro tio la legado ne estas interrompita de vortara manipulado. Pro tio ne okazas rifuzsento ĉe ni, rilate al lia lingvaĵo, kiel ekzemple, kiam oni legas verkon de Karolo Piĉ. Ekzistas artaĵoj, kiuj kreas senton de lingva unuanimeco. Tiaj estas la verkoj de Tibor Sekelj, dum tiuj de Karolo Piĉ distancigas la verkanton de la legataro.

Cl.- Tio faras, ke Tibor Sekelj estas legebla de tre vasta publiko, dum aŭtoro kiel Karolo Piĉ mem limigis sian legataron.

M.- Jes, oni povas konsili la librojn de Tibor Sekelj, kaj interalie Mondo de Travivaĵoj, ne nur al tiuj, kiuj ŝatas bonajn literaturajn verkojn, sed ankaŭ al la junularo, kiu ŝatas aventurlibrojn.

Cl.- Sed tiuj rakontoj estas fakte veraj noveloj, kiuj tutcerte estas bele tre signifaj.

M.- Kaj samtempe ili estas sciencaj dokumentoj rekomendindaj al etnologoj, antropologoj, geografoj.

Cl.- Ankaŭ esperanto-komencantoj trovas plezuron en la legado de la libro Mondo de Travivaĵoj. Pro la riĉeco de la vortaro, ili eble malrapide antaŭenriras en la unuaj rakontoj, sed la simpleco de la stilo faciligas al ili la asimiladon de la serĉitaj vortoj. La tekstoj ne estas tre longaj, kaj la temoj ege variaj. Jen multaj kvalitoj, kiuj helpas la esperanto-komencantojn.

M.- Ni devas aldoni al tiuj kvalitoj la humuron, kiu gajigas la tuton. En la plej danĝeraj momentoj, oni sentas, ke Tibor Sekelj konservis sian ridemon. Tio tutcerte faciligas al li la travivon de malfacilaj momentoj.

Cl.- Jen citaĵo el la novelo Vulkano kontraŭ homo, kie ni trovas Tibor Sekelj en tre malbona situacio. Ni donas ĝin, por ke vi havu ideon pri lia stilo:

Unu el la vulturoj plonĝis vertikale preskaŭ ĝis la grundo kaj per unu flugilo fraptuŝis mian kunulon. Timtremo trairis mian korpon. Ĉu tiuj malbonaŭguraj birdaĉoj antaŭanoncas nian baldaŭan morton ?

Mi ne, havis multe da tempo por mediti. Pluraj vulturoj jam rondflugadis en nia tuja proksimeco. Ni levis niajn bastonojn kaj per ili ni provis forpeli la birdojn. Sed sensukcese. Unu el ili per granda rapideco sin ĵetis malsupren al mi kaj per bato de beko truigis mian grandan pajlan ĉapelon...

M. La venontan semajnon ni legos al vi kiel eble plej grandan parton de ĉapitro el la libro Mondo de Travivaĵoj de Tibor Sekelj, kiun nia hodiaŭa elsendo tiel laŭde prezentis al vi. Ne ĉiam ni estas tiel senrezervaj koncerne esperanto-libron.

Cl.- Ni volonte havigos kopion de tiu ĉi prelego al tiuj, kiuj ĝin skribe petos al Svisa Radio Internacia, Esperanto-Fako, 3015 Berno. Claude Gacond kaj Michel Fresard diras al vi: ĝis la venonta sabato!